# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Julio-Aŭgusto *2003* ***MENSUEL/MONATA*** 74-a jaro, n-roj 7-8 (1177/78)

**Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**

ISSN 1163.0442 ***5 €***

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


## FINIĜIS TRE SUKCESE LA 76-A SAT-KONGRESO EN ĈAŬDEFONO




*Dum la solena malfermo kiun prezidis k-dino Perla Martinelli, de maldekstre sidas: Barkoviĉ, Schram, Martinelli, Berthet, Zelazny.*

Foto: «foto L'Impartial/L'Express»

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*post reveno el la SAT-kongreso mi finas tiun ĉi duoblan numeron de via Sennaciulo. En ĝi vi trovos nur la ĉijarajn Deklaracion kaj Gvidrezolucion. Sekve, la septembra numero estos dediĉita al la detalaj informoj pri la tre sukcesa 76-a SAT-kongreso kaj en la oktobra vi povos legi kompletan protokolon pri niaj kongresaj laboroj. Tiun ĉi numeron via redaktoro finas kun postkongresa impreso ke SAT faras kaj faros bonan laboron; ke ĝi estas nepre necesa kaj utila progresema, neneŭtrala E-Asocio. Mi esperas ke la legado de niaj venontaj numeroj instigos vin pli aktive partopreni en la agado de SAT kaj partopreni en la venontjara SAT-kongreso kiu okazos en aŭgusto 2004 en Bratislava (Slovakio). Do bonan someron al ĉiuj,*

*via Redaktoro*


## NOVA PERANTO EN BRAZILO

Post la tragika forpaso de nia kamarado Gilbert LEDON la perantecon por Brazilo transprenis nia k-do

**José Joaquin LUNAZZI**
Rua Manoel Antunes Novo, 668
BR-13084-157 CAMPINAS-SP
Brazilo
rete: <lunazzi@uol.com.br>

## KAMARADO MAX HOLLINGER 80-JARA

Nia kamarado Max HOLLINGER, konata de tre multaj el niaj membroj, fariĝis en junio 80-jara. Ni elkore gratulas al nia kamarado kaj deziras al li sanon kaj feliĉon.




K-do Hollinger perfekte organizis SAT-kongresojn en Linco, en 1955, 1983 kaj 1990; kunlaboras en Sennaciulo (ofte kadre de Liberpensula frakcio) kaj kreis plurajn bonegajn SAT-anojn inter kiuj la plej konata estas nia litovia perantino. Ankaŭ li ebligis al pluraj SAT-anoj el nepagipovaj landoj partopreni al SAT-kongresoj. Dankon kara Max, kaj nur daŭrigu.

La Redaktoro

S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)

SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !




## *Nova PIV aperis !*

*Akiru ĝin ĉe SAT.*
*Prezo:70 € + afranko*
*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*
*ekster Eŭropo : 10,06 €*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
**Commission Paritaire n° AS-74399**
**Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

# Printempo 2003: Kial denove nun francoj strikas kaj manifestacias?

La nuna franca reakcia registaro amasigas la klasbatalajn konfliktojn, kiuj tial iel konfuziĝas, precipe por la kategorioj de salajruloj, kiujn ili kune frapas. La tri ĉefaj por la nuna momento estas la problemo de la emeritaj pensioj, la tiel nomata malcentrigo, kiu celas dependigi la regionojn pli rekte de Bruselo anstataŭ Parizo kaj la projekto privatigi ĉiujn publikajn servojn kaj redukti la rolon de la ŝtato al la subpremaj, kurioze en respubliko tiel nomataj «regaliennes» («reĝecaj») misioj: polico,




juĝaparato, punsistemo, armeo.

Pri la emeritaj pensioj, la projekto, kiun la registaro decidis trudi estas, resume: kreskigi la salajrulajn kotizojn, plilongigi la devigan daŭron de kotizado, plialtigi la minimuman aĝon de emeritiĝo kaj redukti la emeritajn pensiojn. Unuvorte: la salajruloj devos pagi pli multe kaj dum pli longa tempo por pli malfrue ricevi reduktitan pension. La preteksto de tiu katastrofa socia malprogreso estas statistike konstatita plilongiĝo de la vivo. Tiu statistika ĝeneralaĵo kovras konsideran malegalecon inter sociaj klasoj kaj profesiaj kategorioj.

La financa problemo estas reala, ĉar la rilato elspezoj/enspezoj de la pensiaj kasoj ne ĉesas kreski. La demografia preteksto tamen estas mensoga.

En la kvara plej riĉa lando de la mondo, la sola demografio ne estas la ĉefa faktoro de la situacio. Se la junaj laborpretaj aktivuloj estus pli multaj, ili nur ŝveligus la nombron de la senlaboruloj kaj malstabilaj dungitoj, kiuj jam estas pli ol tri milionoj, reprezentante pli ol 12 % el la aktivularo kaj tiel ili nur pligravigus la deficitojn de la sociprotektaj kasoj. Se la mastraro kaj ĝiaj politikaj reprezentantoj mem tion kredus, kion ili diras, ili ne tiel malice fitraktus la laborantajn virinojn, kiel ili faris kaj plu faras jam de multaj generacioj. La reakcia projekto fakte ankoraŭ pli draste frapas la virinojn ol la ceterajn salajrulojn. La proporcio de junaj virinoj, kiuj mortas dum akuŝo, lastatempe kreskas.

La vera kaŭzo de la reala problemo estas la drasta redukto de la salajra maso, alivorte de la varia kapitalo, dum la profitoj de la grandaj privataj monopoloj flugas supren per duciferaj jaraj kvotoj kaj la reala produktado stagnas pro manko de pagipovaj klientoj. Ĝi rezultas de konscia celado, obstine aplikata, por «redukti la prezon de la laboro». La francaj ministroj kaj reprezentantoj de la mastraro, inter kiuj troviĝas reprezentantoj de oficiala politika maldekstro, ne timas esprimi publike tiun ekstremreakcie klasbatalan celadon, kies vera signifo estas: «redukto de la prezo de la laborforto». La motivo de tiu celado estas la kapitalisma strebado kontraŭ la tendenca malkresko de la meza profitkvoto, kiu rezultas de la kresko de la kapitalo fronte al ĉiam pli malvasta merkato. Ĝi estas klarvorte enskribita en la teksto mem de la Traktato de Romo-Mastriĥto, laŭ kiu la Eŭropa Centra Banko en Frankfurto ricevis interalie la mision severe observi la evoluon de la salajroj, kaj kiun la Eŭropa Komisiono en Bruselo fervore aplikigas. Ĝi ankaŭ estas konstanta rekomendo de la reakcie klasbatalaj tutmondaj organizoj: IMF, Monda Banko, MOK, G7+1, ktp ...

G7 estas neformala kunveno, sen jura ekzisto, de la registarestroj de la sep plej riĉaj landoj. Al ĝi aliĝis Rusio post la disfaligo de Sovetio. Ĝin iniciatis, dum li estis prezidanto de la Franca Respubliko, Giscard d'Estaing, nuna prezidanto de la Komisiono, kiu preparas la Konstitucion de Eŭropa Unuiĝo.

Ĉar la kaŭzo de la problemo estas la manko de kotizoj bazitaj nur sur la salajra maso, do sur la «prezo de la labor(fort)o», la reakcia solvo, kiu konsistas en plia re-




dukto de la salajra maso, ne riskas vere solvi la problemon sed nur povos senfine pligravigi ĝin. Tiom pli, ke la nuna registaro, kiel la antaŭaj, malavare faras senĉesajn donacojn al la kapitalo per deprenoj el la sociprotektaj kasoj, financataj per salajrulaj kotizoj. Ĝi elvokas la bildojn de hundo turniĝanta por mordi sian voston kaj de azeno, kiu sufokas sin tirante sur sia ŝnuro por liberiĝi.